

Brokanta servo de **CDELI**

Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Internationale

Bibliothèque de la Ville, rue du Progrès 33, Case postale 3034

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Biblioteko de la Urbo, strato Progrès 33, Poŝtfako 3034

CH-2303 La Chaux-de-Fonds

Archiviste/arĥivisto: Claude Gacond.

Telefono:

el Svislando : 032 967 68 42

el eksterlando : +41 32 967 68 42

Ĝeneralaj informoj

Celo de la servo

La brokanta servo de CDELI helpas al kolektantoj de esperanta kaj interlingvistika materialo (individuoj aŭ institucioj). Malnovaj libroj, broŝuroj kaj periodaĵ-numeroj, aperintaj en esperanto kaj en aliaj planlingvoj, estas proponataj sen profitcelo. Claude Gacond, la arĥivisto de CDELI, plenumas sian funkcion sen ricevi salajron. Tial la rezulto de la koncerna agado centprocente iras al CDELI mem), fako de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, cele al akiro de al ĝi mankantaj dokumentoj.

Ofte unikaj dokumentoj

La listigitaj titoloj konsistas el plej ofte dokumentoj unikaj. Tial povos ilin akiri tiuj, kies mendoj alvenos unuavice. Niaj listoj eble registras titolojn intertempe elĉerpitajn. Tial antaŭ ol pagi, mendinto atendu nian fakturon.

Aĉetmaniero

Aĉetemulo sendu la liston de la titoloj, kiujn li ŝatus akiri, al la poŝta adreso de CDELI (bonvolu skribi tre legeble):

CDELI, Bibliothèque de la Ville

Strato Progrès 33, Poŝtfako 3034

CH-2303 La Chaux-de-Fonds (Svislando)

aŭ uzu la retan mendilon: <http://www.cdéli.org/brokantejo-mendilo.php>

Nepre indiku la koncernajn titolojn, kaj *ne la vic-numerojn*, kiuj konstante ŝanĝiĝas sekve al elimino aŭ alveno de libroj. Responde vi ricevos fakturon, kiu listigos la reale disponeblajn brokantaĵojn. Tuj kiam vi estos paginta la koncernan monsumon, tiam vi ricevos la rezervitajn dokumentojn. Sed tiu rezervado de dokumentoj daŭros nur dum trimonata periodo. Se dum tiu sufiĉe longa tempo ne alvenos la pago, tiam la rezervitajn brokantaĵojn ni remetos je dispono de aliaj interesatoj. Do nepre sin detenu de mendo interesato nepagipova. La prezojn ni indikas en euroj: €.

Periodaĵoj

La proponitaj periodaĵoj estas disponeblaj je la prezo de po € 4.- por revu-kajero, senkonsidere pri ties paĝonombro. Koncerne al raraĵoj altvaloraj pli altaj prezoj estas indikitaj sur la listo mem.

Necesas iom da pacienco

Ni ordigas la ricevitajn mendojn laŭ ties alvendato. Ĉiujn ni laŭvice kontentigas. Sed ĉar Claude Gacond ne ĉiam estas surloke kaj ĉar la serĉado de la dokumentoj, ĉefe por la revu-numeroj, rabas multe da tempo al li aŭ al liaj kunlaborantoj, nur malrapide ni kapablas efektiviĝi nian laboron. Ofte ekde la alveno de mendo ĝis ties kontentigo disvolviĝas pluraj semajnoj. Do mendinto havu iom da pacienco.

Surloka esploro de nia brokanta materialo

La surloka ekzameno de nia brokanta materialo eblas nur post fikso de preciza rendezuo kun Claude Gacond, kiu principe, se li ne ferias aŭ ne prelegvojaĝas, deĵoras en CDELI la matenojn lunde, marde kaj merkrede de la 8h30 ĝis la 11h30. Tiam li estas ĝenerale rekte atingebla telefone en CDELI mem.

Eraroj:

La pretigo kaj konstanta ĝisdatigo de tiuj ĉi listoj konsistigas grandan laboron. Ni konscias, ke eraroj ne eviteblas. La registrado pli malpli alfabetita laŭ la titoloj montriĝis pli taŭga, ol la aŭtoro. Kiam ni havas je dispono pli ol unu ekzempleron, tion ni mencias inter < >.

Kontaktadreso

Ĉiuj mendoj, korespondaĵoj kaj eblaj rendezu-petoj direktiĝu al :

CDELI, Biblioteko de la Urbo, Strato Progrès 33, poŝtfako 3034, CH-2303 La Chaux-de-Fonds.

Telefono: el Svislando 032 967 68 42

el eksterlando +41 32 967 68 42

Rete: <http://www.cdeli.org/kontakto.php>

Kontoj:

Kun klara indiko ĉiuj pagoj direktiĝu :

ĉu al la svisa poŝta konto de Claude Gacond: IBAN CH 46 0900 0000 2300 6818 6.

ĉu al la UEA-konto de Claude Gacond: clga-c.

www.cdeli.org